

La Espero

SVENSKA ESPERANTOTIDNINGEN

2 MARTO 1978
66-A JARKOLEKTO

ISSN 0014-0694
FONDITA EN 1913

Publika diskuto

Ni kunvenos en Uppsala la 22an kaj 23an de aprilo por diskuti la agadon de Sveda Esperanto-Federacio kaj de la sveda esperantomovado ĝenerale. Tio en si mem estas sufiĉe granda tasko, sed ne sufiĉa por la organizanta klubo, kiu fieras esti unu el la plej malnovaj kluboj de la mondo esperantista. Por la unua posttagmezo (la 22an, do sabaton) oni planas podian diskuton, kiu havas la provizoran titolon «La signifo de lingvo por internaciaj rilatoj».

Esperantistoj ofte jam diskutis tiun ĉi temon, sed la upsalanoj volas diskutigi la neesperantistojn pri ĝi! Kaj ne kiuj ajn neesperantistoj!

Laŭ ricevita informo pluraj el la plej eminentaj kulturpersonoj de Uppsala jam promesis sian partoprenon — sed interkonsente kun la organizantoj ni atendas kun la publikigo de iliaj nomoj ĝis la venonta numero de *La Espero*. Tion ni faras pro la fakto, ke iuj el la nomoj je la nuna momento ne estas centprocente certaj.



La jarkongreso de SEF en Uppsala, malgraŭ la plimallongigita tempo, ŝajnas fariĝi unu el la kongresoj kun bonaj eksteraj rilatoj (pri tiaj oni ankaŭ ne povas plendi rilate al Falköping, i a). Podia diskuto kun konataj partoprenantoj certe allogos la gazetaron. Estas memkompreneble, ke tia diskuto devos okazi en la sveda; sed ni havos abundajn eblecojn uzi esperanton en aliaj cirkonstancoj dum la jarkongreso.

Aliĝu antaŭ la 10a de aprilo!

La jarkongreso de SEF en Uppsala komenciĝos jam en la mateno la 22an de aprilo.

La tutan programon vi povas vidi en la kadro ĉi sube. Kiel kongresejo funkcios Katedral-skolan, en kiu ni kaj kunsidos kaj manĝos. La manĝojn liveros al ni apuda restoracio, cetere funkcios memservado.

Tiuj, kiuj loĝos en hotelo, loĝos en apuda hotelo Upplandia, aliaj en iom pli foraj studentaj ĉambroj, unutilaj.

En la antaŭa numero de *La Espero* vi trovis pagilon por mendi «pakajon» dum la jarkongreso, kiu enhavas ĉiujn kostojn. Se vi povas aranĝi tranokteblecojn alimaniere, vi po-

vas aliĝi al nur kelkaj eroj. Vi devas en ĉiu kazo pagi kongresan kotizon, ĉio alia estas libera.

La kotizoj estas jenaj:

Kongreskotizo	30,-
Hotelĉambro, dulita, po persono	85,-
2 lunĉoj (inkl. trink.)	40,-
Vespermanĝo (inkl. trink.)	40,-

Por SEJU-membroj ĝis 25-jaraĝaj la kongreskotizo estas 15 kronoj; ankaŭ por ili (ĉefe) estas eble elekti loĝadon en studenta ĉambro por 40 kronoj.

La kotizojn vi povas pagi al pĝ 94 78 44 - 7, Esperantokongresen Uppsala 1978.

Provizora programo Uppsala 1978

Sabaton, la 22an de aprilo

- 09.00 Kongresa oficejo malfermiĝas en Katedral-skolan
- 11.00 Malfermo kaj Jarkunveno de SEF
- 12.30 Lunĉo
- 13.30 Podia diskuto (en la sveda)
- 16.00 Ev. kafaŭzo
- 16.30 Daŭrigo de jarkunveno de SEF
- 18.00 Paŭzo
- 19.00 Vespermanĝo, salutoj, muzika programo k a

Dimanĉon, la 23an de aprilo

- 09.00 Jarkunveno de Eldona Societo Esperanto
- 09.00 Jarkunveno de SEJU (ĝis 12.00)
- 10.00 Fakaj kunsidoj
- 12.00 Fermo kaj poste lunĉo
- 13.00 KELI invitas al diservo
- Post la diservo okazos libervola kultura promeno tra Uppsala, kiu daŭros proksimume horon kaj duonon

La Espero

Organ för Svenska Esperantoförbundet

Adress: Fack, 122 04 Stockholm-Enskede

Ansvarig utgivare: Bertil Åkerberg

Redaktör: Franko Luin, Myggdalsvägen 123, 135 00 Tyresö

Telefon: 08 - 712 82 91

I redaktionen: Sven Andersson, Åke Blomberg, Anita Lindblom, Geoffrey Sutton

Prenumeration 1978: 40 kronor per år, postgiro 20 12 - 3, Sv. Esperantoförbundet
Tidningen utkommer med 8 nummer per år: i februari, mars, april, maj, september, oktober, november och december.

Manusstopp: den 10, månaden före utgivningsmånaden
Sats: Esperantoförbundet

Tryck: Sturetryckeriet, Stockholm 1978

Esperantoförbundet

Postadress: Fack, 122 04 Stockholm-Enskede

Besöksadress: Högerv. 31

Telefon: 08 - 48 99 76

Förbundets expedition har öppet tisdagar kl. 18 — 20.

Postgiro: 20 12 - 3

Medlemsavgift 1978: direktansluten medlem 50 kronor, ungdomsmedlem under 26 år 25 kronor, familjemedlem utan tidning 15 kronor

Prenumrationsavgift för *La Espero* och *Esperanton* nytt ingår i medlemsavgiften. Medlemmar under 30 år får dessutom ungdomsförbundet SEJUs blad *ktp*.

Esperantoförlaget

Postadress: Fack, 200 42 Malmö

Besöksadress: Möllevångsgatan 20 B

Öppettider: 1 sept — 15 maj: onsdagar kl. 10 — 11, torsdagar kl. 17 — 18

Skriftliga beställningar expedieras hela året, även under sommaren.

Telefon: 040 - 12 20 29

Postgiro: 578 - 5

Expedition: Anna-Greta Strönné

Medhjälpare: Wivi Nilsson
Styrelsens ordförande: Åke Blomberg

JES & NE

En prisjämförelse om Bulgarienresan

Varning! Hela denna notis är reklam för SEFs kongressresa till Varna. På sista sidan hittar du en utförlig beskrivning av resan med olika prisalternativ. Här kommer en jämförelse med ett annat arrangemang som du kanske fått på brevpaper från Austrian Airlines.

Det erbjudandet gäller bara resa till Varna till ett pris av ca 1300 kronor från Stockholm. Om du lägger till det det billigaste du kan beställa separat, t ex privatrum med halvpension under samma tid (14 dagar), får du lägga till ca 900 kronor (65 kronor om dagen). Det blir 2200 kronor totalt. För 1950 kronor får du med SEFs resa under sex av de 14 dagarna bo i stället på **första klass hotell med helpension** (prisjämförelsen gäller avresa från Stockholm).

Det finns några fördelar till:

- med SEF flyger du direkt till Varna — med AA mellanlandar du i Köpenhamn, Wien och Sofia innan du kommer till Varna (med väntetider och ev. byte av flygplan)

- du slipper krånglet med separat beställning av logi
- du har möjlighet att teckna avbeställningsskydd vid sjukdom — och få tillbaka hela det inbetalade beloppet, minus 200 kronor
- en färdledare kommer att följa med för att klara upp de ev.

problem som kan uppstå under resan.

Du kanske inte behöver fler argument. Det ekonomiska är talande nog.

Sveriges Radio har fått en skiva

Den som önskat sig att höra en sång på esperanto i Sveriges Radio har varit hänvisad till en enda skiva: *Jen nia mondo* med Duo Espera. Nu har Sveriges Radio fått en ny skiva i gåva av Esperantoförbundet (även den tidigare var en gåva), nämligen *Tra l'mond* med Oliver Tzaut. Du har säkert läst en recension om den i förra *La Espero*.

Så när du nästa gång har något med Sveriges Radio att göra och har möjlighet att önska dig en melodi, tänk på Tzaut. Även icke-esperantister kommer att tycka att skivan är bra.

Växande«klubb» av understödjande

Antalet medlemmar i **Klubo Cent** växer. Under februari har 16 nya «anmält» sig till klubben: Åke Blomberg, Lidköping, Jan-Olof Svensson, Tidaholm, Hjalmar Örtenblad, Ljungaverk, Alice Johansson, Norrköping, Nils Johansson, Norrköping, Curt Olsson, Uddebo, Tomas Jansson, Uppsala, Gunnar

Olsson, Skövde, Valfrid Sandén, Bromma, Eric Carlén, Kumla, Karl Gustavsson, Bergvik, David Kullberg, Halmstad, Elna Jansson, Trångsund, Nils Olsson, Höör, Gustav Nygård, Göteborg, Tore Johansson, Kalmar.

SEF tackar till samtliga, som på detta sätt vill hjälpa förbundet ekonomiskt. Att 23 medlemmar på så kort tid uppmärksammat förbundets initiativ ser styrelsen som ett tecken på förståelse för organisationens behov.

Ändrat datum för examen

Nej, det blir inget examen den 23 april, som tidigare meddelats. Den dagen har både Esperantoförbundet och SLEA sina möten — det blir alltså en olämplig dag att ta examen, anser Svenska Esperantoinstitutet.

Examen blir det den **7 maj** i stället. För anmälan gäller vad som meddelats i *La Espero* 1/78.

Har du översättningar i skrivbordslådan?

Har du märkt att *La Espero*, Esperantoförbundet och Esperantoförlaget anordnar en översättningstävling (från svenska till esperanto) i år. Man kan översätta poesi, skönlitterär prosa eller fackprosa; man väljer själv vilken bit (eller bi-

GEMO DE LA MONDA ROMANARO



LA
INGENIA
HIDALGO
DON QUIJOTE
DE LA
MANCHA

de Miguel
de Cervantes
Saavedra

NUN EN
ESPERANTO!

Antaŭpago necesa. Livertempo minimume 3 semajnoj.

El la hispana tradukis Fernando de Diego. 820 paĝoj. Ilustrita per du dek gravuraĵoj de Gustave Doré. Granda recenzo en la januara numero de revuo *esperanto*. Havebla pere de *Esperantoförlaget*, Fack, 200 42 Malmö, postgiro 578-5.

Prezo kun imposto 230,-

tar) man vill översätta. Läs igenom tävlingsreglerna i förra nr av *La Espero*.

Tävlingstiden för i år går ut den 31 mars — så låt inte dina försök ligga i skrivbordslådan, utan skicka dem till oss!

Radio Zagreb jubileas: 25 jara

«*Parolas radio Zagreb*». De 25 jaroj la esperantistoj povas aŭdi tiun enkondukan frazon en la malfrua nokto ĉiun vendredon 5 minutojn post noktomezo.

La 16an de aprilo estis la unua dissendo kaj ĝin sekvis 25 jaroj da dissendoj, sen interrompo. Radio Zagreb estas ne-esperantista instanco, tial la daŭro de la dissendoj estas despli grava afero.

Radio Zagreb havas aŭskultantojn ankaŭ en Svedio kaj unu el la plej karaj al la redakcio kaj Emilija Lapenna, kiu gvidas ĝin, estas Åke Blomberg, al kiu Radio Zagreb esprimas sian dankon ankaŭ ĉi-manierne.



Gratulu al la jubileanta radiostacio kaj aŭskultu ĝiajn dissendojn ankaŭ estonte. Ilia adreso estas: Radio Zagreb, Esperantofako, Zagreb, Jugoslavio.

Revuo pri lingvaj problemoj

LINGVAJ PROBLEMOJ KAJ LINGVO-PLANADO estas internacia kaj interfaka revuo, kiu aperas ĉe la eldonejo Mouton, la ĉefa lingvistika eldonejo en la mondo. La Centro de Esploro kaj Dokumentado pri la Monda Lingvo-Problemo (CED) en Rotterdam aŭspicias tiun ĉi revuon kaj dediĉas ĝin al ĉiuj, kiuj havas, aŭ strebas por solvi, lingvajn problemojn. En tiu lasta kategorio troviĝas ĉiu aktiva esperantisto.

LPLP interesas esperantistojn pro du ĉefaj kialoj. Unue ĝi resumas ĉiun artikolon amplekse en esperanto; kaj due ĝi pritraktas ĝuste tiujn sociajn aferojn, kiujn esperantistoj prilaboras: lingvajn diferencojn, lingvajn barilojn, lingvan diskri-

minacion kaj lingvan planadon — la konscian kaj sistemecon solvadan de lingvaj problemoj.

Elstaraj fakuloj kontribuas al LPLP; elstaraj fakuloj ankaŭ recenzas artikol-proponojn. Tio garantias la altan kvaliton de LPLP.

LPLP estas daŭrigo de LM-LP, sed samtempe ankaŭ nova revuo. Ĝi estas abonebla ĉe Eldona Societo Esperanto por 65 kronoj. Sed vi povas fari pli ol nur aboni ĝin: vi povas eble helpi en tio, ke aliaj abonu ĝin: bibliotekoj, privatuloj, fakuloj.

Kiel vi eble jam de antaŭe scias, la artikoloj en ĝi estas presitaj en diversaj naciaj lingvoj: angla, franca, rusa, itala, germana ... En esperanto estas ĉiuj resumoj.

Forlasis nin por ĉiam

La 16an de decembro mortis en Falun **Adolf Larsson**, 89 jarojn aĝa.

Adolf Larsson fariĝis i a ĉefkontisto ĉe la asekurkompanio Hansa, membro de la estraro de SPP, la pensikaso kaj prezidanto de la Asocio de asekurofistoj.

En 1905 li kunfondis la esperantoklubon de Falun kaj li dum pluraj jardekoj apartenis al la estraro de SEF.



En Nässjö mortis **Martin Fejde**, 86 jara.

Li estis energia iniciatinto de la sindika fonduso de SEF kaj organizinto de la prelegoj kaj Cseh-metodaj kursoj de Tiberio Morariu tra tuta Svedio.

La 16an de februaro mortis en Norrköping **Sven Ragnar**, unu el la fondintoj de la tiea klubo kaj kara amiko de multaj.

Jam kiel 18jara junulo li ekinteresiĝis pri esperanto kaj energie kaj serioze studis la lingvon. Preskaŭ seninterrompe ekde 1929 li aktive partoprenis la gvidadon de la klubo de Norrköping.

Lia kapablo, bonvolo kaj modesta kamaradeco donas al ni esperantistoj memorbildon pri li kiel, ne nur korpe, sed ankaŭ anime altstatura persono.

Al ĉiuj tri ni dankas pro la farita laboro kaj sendas niajn kondolencojn al iliaj familianoj.

HODIAŬ

SEF estas vi kaj vi kaj vi kaj vi kaj mi

Vi eble pli ol unufoje pensis: Tion SEF povus fari! Kial SEF ne faras tion? Kiel se SEF estus io ie for, al kio oni povus doni ideojn kaj taskojn kaj atendi ke per tio io okazos.

El tiu rilato SEF ne ekzistas. SEF estas nenio. Aero.

Kiel staras super tiu ĉi peco, SEF estas vi, kaj viaj kamaradoj en la klubo, kaj kamaradoj en aliaj kluboj kaj ankaŭ tiuj, kiuj ne apartenas al iu klubo. SEF estas vi kaj mi. Tial kiam vi pensas: SEF povus fari tion, vi unuavice ankaŭ pensu: mi povus fari tion. Miaj kamaradoj povus fari tion.

Aliajn fojojn vi eble pensas: Ili en Stockholm, kaj verŝajne per tio pensas la estraron. Ekzistas ja iuj "ili en Stockholm", sed tio ne nepre estas iuj estraranoj, sed aro da simplaj membroj, kiuj dediĉas iom da sia tempo — apud la tempo, kiun ili dediĉas al siaj kluboj — ankaŭ helpante en deĵorado en la oficejo kaj ekspedado. La estraron vi nuntempe fakte trovas ankaŭ en Malmö, Gotenburgo, Örebro, Nybro.

Vi eble miras, kial mi skribas pri tio ĉi. Mi ĵus legis en la klubfolio de la klubo de Västerås, la VEKa gazeto, plendon pri SEF. Mi citu: «Ni fosu nian sulkon en la sveda esperantomovado, flanke de SEF — aŭ eĉ spite de SEF. Iom amare dirite, eble, sed esprimu por natura reakcio je la sinteno de SEF koncerne de novembra prelegvojaĝo en Svedio de nia itala samideano, patro Albino Ciccanti el Rimini.» La skribinto, Victor Janheim, plendas, ke la funkciuloj de SEF montris neniun intereson por la afero.

Jack Snarberg el Jönköping havis la ideon inviti pastron Ciccanti kaj mi scias (ĉar mi aŭskultis lian telefonvokon), ke li akceptis administri tiun prelegvojaĝon. Kun tre bona sukceso! Tio, laŭ mi, estas bona maniero kompreni: «SEF estas ankaŭ mi». Iu devas fari tiun laboron. Iu persono; kaj ne gravas kie tiu persono loĝas kaj kian funkcion li aŭ ŝi havas.

Kiel dirite, SEF estas vi kaj mi. Kaj la agado de SEF estas la sumo de via kaj via kaj via kaj mia agadoj.

Franko Luin

La unua leciono temas pri spicoj

Kian nomon havas la objektoj, kiuj ĉirkaŭas nin? Kiel nomiĝas tio, kion ni faras en nia hejmo, en la laborejo, en la ĝardeno, dum la promenoj? Plej ofte ni ne konas la ĝustajn vortojn kaj estas devigataj uzi svedan esprimon. En tiu ĉi serio da artikoloj sub la titolo ĈIUTAGA ESPERANTO ni provos kune lerni tiujn ĉiutagajn esprimojn. Ni komencas en la kuirejo.

Estas konvene kulturi spicojn en la Nordo pro la longaj someraj tagoj. Tio donas al la spicoj pli fortan aromon. Multaj el ni aj spicoj venis ĉi tien dank'al la monaĥoj dum la mezepoko. Aliajn uzis jam la vikingoj.

Por kulturi spicojn vi ne bezonas grandan terpecon; potu sur la balkono sufiĉas. Kaj ĝuste nun estas bona tempo plani la spicĝardenon.

De kelkaj spicoj oni uzas la foliojn. Tiujn oni rikoltas ĝuste antaŭ la ekfloro. De aliaj oni uzas la florojn aŭ la semojn. Ĉiam gravas, ke oni rikoltu en mateno, kiam la suno brilas kaj la kreskaĵoj estas plenaj da eteraj oleoj.

La plej multajn spicojn oni traktas jene:

Oni fortranĉas la tutajn kreskaĵojn, gargaras ilin kaj pendigas bukedojn ĉe la kuirforno, tiel ke ili estas facile havigeblaj. La bukedoj ĉiam havu nur unu specon da spico, neniam miksu ilin. Se vi volas sekigi ilin, pendigu en aera, varma kaj seka loko. Sekigitaj spicoj havas pli fortan guston ol la freŝaj. Kiam bukedo estas tute seka, vi deŝiras la foliojn kaj/aŭ la florojn kaj metas en hermetikan ujon. Se vi uzos la semojn, vi metu la bukedon en platan sakon kaj pendigu la sakon. Tiam la semoj kolektiĝos en ĝi.

Jen mallonga priskribo pri kelkaj spicoj.

Absinto

(*artemisia absinthium*; malört) Tiu ĉi plurjara kreskaĵo, ĝis unu metro alta, kun arĝenteaj folioj estas tre bela kiel dekoracio. Ĝi estas delonge konata kaj uzata en medicino kaj brando. Absinto postulas multe da sunlumo kaj preferas argilan teron.

Aneto

(*peucedorium graveolens*; dill) Unu el la plej uzataj spicoj en Svedio. Semu plurfoje de majo ĝis junio, kaj vi havos freŝan aneton dum la tuta somero kaj



anetajn semojn jam en julio. Sekigu la semojn, sed prefere frostigu la planton. La semoj estas bezonataj por la kankroj kaj la kankra haringo, ruladoj de haringo bolkuiritaj kun hakitaj tomatoj kaj anetsemoj. Same bezonata estas por freŝaj terpomoj la tuta ankoraŭ ne floranta planto. Nur la foliojn oni hakas por majonezo kaj salata saŭco.

Baziliko

(*ocimum basilicum*; basilika) Hinda kultkreskaĵo, unujara kaj ĝis 50 cm alta. Uzebla por supoj, saŭcoj kaj ĉiuj tomatenhavaj manĝaĵoj. Mi volonte ĝuas freŝajn tranĉaĵojn de tomato kun baziliko. Krome la muŝoj ne ŝatas ĝin. Semu ĝin endome fine de aprilo kaj elmetu la plantojn, kiam ne plu estas risko pri nokta frostoj.

Cerefolio

(*anthriscus cerefolium*; svensk körvel) Unujara, proksimume 40 cm alta kreskaĵo, de kiu vi rikoltas dum la tuta somero. Cerefolion oni uzas kune kun aŭ anstataŭ petroselo. Supo farita de delikataj folioj vere bongustas. Alia ebleco estas uzi ĝin en spicbutero.

Drakonkolo

(*artemisia dracuncul*; dragon) Plurjara, ĝis 80 cm alta kreskaĵo. Tiu ĉi spico bone eltenas



nian klimaton. Aĉetu nur unu planton. Se ĝi ne sufiĉas, vi povos dividi ĝin post kelkaj jaroj.

Oni prenas la freŝajn ŝosojn kaj uzas ilin kun la delikata gusto en salatoj. Sekigita drakonkolo estas tre uzebla por saŭcoj kaj necesa en bearna saŭco. Ĉiam uzu ĝin kun modereco, neniam lasu ĝin boli kun la manĝaĵo dum longa tempo.

Majorano

(*origanum majorana*; mejram) Unujara, eta planto, kiu estas tre uzebla. Ŝutu ĝin sur legomojn, spicu la rostitan bovaĵon, la kokidon kaj la ŝafidrostajon. Ankaŭ uzebla ĝi estas kun fiŝo, en oleo kaj vinagro. Majorano postulas multe da sunlumo.

Meliso

(*melissa officinalis*; citronmeliss, hjärtansfröjd) Ĝi estas facile kulturata spico kun citrongustaj folioj. Ĝi estas plurjara kaj ĝis 60 cm alta. Uzebla kiel teo, en salatoj kaj saŭcoj. Konata antaŭ longe kiel medicino por plilongigi la juncon.



Petroselo

(*petroselinum crispum*; krusbladig persilja) Petroselo estas dujara kaj kreskas plej bone en argila tero. Semu ĝin komence de aprilo, se eblas, ĉar la semo bezonas sufiĉe longan tempon por ekĝermi kaj la tero devas esti malseketa. Estas bona ideo miksi la semojn kun tiajn de rafaneto. La rafanetsemoj ĝermas pli rapide, kaj per tio oni scias, kie venos la

petroselo. Rikoltu kontinue, tiel ke ĉiam troviĝu junaj folioj. Estas konvene planti petroselon en potoj endome por la vintra bezono.



Pipromento

Krispmento

(*menta piperita*; pepparmynta) (*menta crispa*; krusmynta) Plurjaraj kreskaĵoj, pipromento plej taŭga por dolĉaj kaj krispmento por aliaj manĝaĵoj.

Krispmenton vi uzu por ŝafa kaj ŝafida viando, por mentsaŭco, legomoj kaj salatoj.

Pipromento estas bona kiel teo, en frukta salato (nur prenu unu-du foliojn) aŭ hakita kaj miksitaj en sukero por ŝuti sur bulkojn kaj tortojn.



Salvio

(*salvia officinalis*; salvia) Plurjara arbusto kun molaj grizverdaj folioj kaj odorantaj floroj. Ĝi postulas multe da sunlumo, malpezan teron kaj replantadon ĉiun trian jaron. Salvio estas bona spico por grasaj manĝaĵoj kaj kun hepataĵo.

Ŝenoprazo

(*allium schoenoprazum*; gräslök) Ŝenoprazo kreskas preskaŭ ĉie, se nur troviĝas iom da akvo. Estas facile ricevi ŝenoprazon el la semoj, sed tio donas malgrandan rikolton dum la unua jaro.

Se oni volas havi freŝajn foliojn, estas grave tondi la ŝenoprazon ofte. Mi ĉiam lasas iom da ŝenoprazo flori, ĉar la floroj estas tiel belaj kaj vere ornamas la spicĝardenon.

Verkis kaj desegnis
Anita Lindblom

Ankaŭ neesperantistoj kongresos en Svedio

La Espero jam kelkajn fojojn informis pri okazonta internacia renkontiĝo de Freinet-instruistoj, kiu okazos ĉijare en Årjäng, de la 23a de julio ĝis la 5a de aŭgusto.

La datoj, kiel vi povas vidi, koincidas kun la datoj de la UK en Varna, tial ili estas el multaj vidpunktoj maltaŭgaj — se oni kun intereso volus partopreni ambaŭ aranĝoj.

Sed kial neesperantista aranĝo konkurencu kun UK?

La Freinet-movado ja estas neesperantista, sed esperanto jam delonge ludas tre gravan rolon en ĝi. Je pluraj okazoj ĝi estis unu el la oficialaj konferencaj lingvoj, kaj tio ĝi estos ankaŭ en Årjäng, apud la franca kaj sveda lingvoj.

Ekzistas ankoraŭ unu kaŭzo ligita al tio: la sveda gazetaro tutcerte detale sekvos tiun aranĝon. Estas tial despli grave, ke esperantoflanko de ĝi estu bona. Do se vi pro iu kaŭzo ne intencas viziti la Universalan Kongreson ĉijare, serioze pripensu kunhelpi en Årjäng. Vi ne bezonas esti instruisto por rajti ĉeesti tie.

Kontaktiĝu kun Ingemar Nordin, Viksgatan 3, 672 00 Årjäng, kiu estas la organizanto de la renkontiĝo.

UNESKO-KONFERENCO

Alia aranĝo, en kiu iu esperantisto rajtos ĉeesti, okazos en Stockholm en la ĉijara printempo. Ĝin organizas Unesko kaj UEA estas invitita sendi observanton al ĝi. La konferenco temos pri komunikado.

SOCIOLOGOJ EN UPPSALA

Inter la 14a kaj 19a de aŭgusto okazos en Uppsala la Naŭa Monda Kongreso de Sociologio, en tute alia skalo ol la konferenco de Unesko. Ankaŭ ĝi estas tute neesperantista, sed ĝi estas ankaŭ iom interesa por ni esperantistoj. En ĝia kadro okazos vasta programo de formalaj kaj neformalaj kunsidoj pri lingva sociologio.

La programeroj pri socia lingvistiko estos i a la jenaj: Lingvo kaj internaciaj rilatoj; Lingvo kaj etna interagado; Lingvo kaj sekso; Lingvaj kaj nelingvaj aspektoj de rekta persona komunikado; Lingvo kaj amas-komunikado; La sociologio de

lingvolernado kaj lingvoinstruado; Lingvoplanado kaj sociekonomia evoluigo; La amplekso, celaro kaj metodaro de la socilingvistiko; kaj aliaj temoj de la socilingvistiko.

Pri ĉiu programero okazos po unu publika sesio, kie prezentiĝos ĝis kvar superrigardaj referaĵoj, kiuj konigos la aktualan staton de diversaj socilingvistikaj esplorfakoj al nespecialista publiko. La referaĵojn diskutos unu aŭ pluraj oficialaj diskutistoj kaj la ĉeestantaro ĝenerale. La kunsidtempoj de tiuj sesioj estas jam deciditaj. Krome la programeroj enhavos senliman nombron da diskutrondoj dediĉitaj al specialaj problemoj, kie oni povos ankaŭ prezenti aliajn referaĵojn. Ties kunsidtempojn oni devos ankoraŭ fiksi.

Oni rajtas kontribui referaĵojn, sed la tempolimo por rajti fari tion jam pasis. Eblas tamen ankoraŭ aliĝi al tiu kongreso kaj partopreni en la diskutoj. (Franko Luin, adreso ĉe SEF povas sendi informojn pri la aliĝkotizoj kaj aliĝtempoj.)

La kongrestemo estas «Vojo de socia evoluado». La programon konsistigos kvar ĝeneralaj sesioj, 17 laborgrupaj sesioj, 13 simpozioj kaj la sesioj de 24 porokazaj grupoj, 11 aliaj asocioj kaj 34 esplorkomitatoj. La oficialaj lingvoj de la kongreso estas la franca kaj angla.

La aliĝkotizoj estas iom altaj, 300 skr ĝis la fino de aprilo, poste pli; 110 skr por studentoj kun eventualaj krompagoj. Petu, kiel menciite, pli detalajn informojn, se vi interesigas pri partopreno.

Estas jam konate, ke ĉeestos grupo da esperantistoj el eksterlando, do vi ne estos sola en la supozeble granda amaso da alilingvanoj.

Ekzistas ebleco ricevi vojaĝstipendiojn al tiu ĉi kongreso, precipe por tiuj, kiuj intencas kontribui al la programo. Tio eble ne estas grava por niaj legantoj en Svedio, sed certe por tiuj de aliaj landoj. Ciaspecajn pli detalajn informojn, kaj pri la kongreso kaj pri la vojaĝsubvencioj, donas Jonathan Pool, Dept of Political Science, DO-30, University of Washington, Seattle, Washington 98195, Usono, kiu estas la programorganizanto de la kongreso.



Uppsala estas interesa ankaŭ por aliaj organizaĵoj, ne nur la esperantistoj; dum aŭgusto kongresos sociologoj.

BÖCKER FÖR VARJE SMAK

Nu är det lämpligt att låta nybörjarna få en bredvidläsningsbok:

EL LA VIVO DE ZAMENHOF av G. Henriksson, lättläst och gjord för just nybörjarna
Pris 3,50

För fortsättningskurser och för vem som helst:

KREDO FLOROJ DINAMITO av E. Olsson, om våra 'stora' svenskar (den heliga Birgitta, Linné och Nobel). Utmärkt också som presentbok till brevvänner.

Pris häft. 13,25, inb. 18,10

KAŬKAZAJ RAKONTOJ av den ryske författaren M.J. Lermontov, ur hans främsta roman «Heroo de nia epoko».

Pris 17,—

KOKO KRIAS JAM, originalnoveller av F. Szilagyi åter utkommen. Många olika ämnen, bl a om Röda Korsets grundare H. Dunant. Kritiken lovordar boken: «Majstornoveloj!»

Pris 49,—

ESPERANTOFÖRLAGET

Fack, 200 42 Malmö, postgiro 578-5

Moms är inräknad i priserna. Om faktura önskas tillkommer porto och moms för denna = 1,75.



Komenciĝis la sezono de la jarkunvenoj

Komenciĝis la sezono de la jarkunvenoj kaj la redakcio de *La Espero* jam ricevis kelkajn raportojn pri ili.

En **Kumla** jarkunvenis la esperanto-klubo la 25an de januaro en la ĉeesto de multaj klubanoj kaj de gastoj el Hallsberg.

Ĉar la multjara prezidanto Fritz Stöm pro okulmalsano petis nerelektan, la jarkunveno trovis novan prezidanton en s-ano Martin Adelind. Kiel kasiisto estis reelektita Bengt Söderlund kaj kiel ceteraj estraranoj Tage Goldheim, Fritz Ström kaj Ingrid Larsson.

Dum la kafaŭzo oni dankis al la ĝisnuna prezidanto Fritz Ström kaj transdonis al li florbukedon.

Je la fino Sten Gustavsson el Hallsberg parolis pri vojaĝo en Svislando kaj montris bildojn de tie.

Ankaŭ la Esperanto-societo de **Gotenburgo** jam jarkunvenis

— LA ESPERO 1913 —

Vi bläddrar igenom *La Espero* från 1913

Det var nära att förra numret av *La Espero* fick beteckningen «Februaro 1913». I sista stund försvann årtalet på tryckeriet, och tidningen utkom helt enkelt i februari, utan årtal.

La Espero har nämligen redan en gång tidigare kommit ut med beteckningen «februari 1913», och det var tidningens allra första nummer, för 65 år sedan.

Det felaktiga årtalet väckte lite tankar om året 1913. Vad intresserade esperantisterna just det året, vilka problem hade de, vad intresserade de sig om? Så föddes tanken om att i en serie korta artiklar redogöra för 1913 och esperantisterna på den tiden. Här nedan följer det första utdraget. Vi citerar ur rubriken *Jorden runt* i tidningens första nummer.

«*Ryssland*. — Den ryska tidningen 'Ondo de Esperanto' konstaterar, att Esperantorörelsen i Ryssland under det gångna året varit fullt tillfredsställande. Ett flertal nya föreningar ha bildats, talrika både högre och lägre kurser ha ägt rum och åtskilliga föredrag ha hållits.

Såsom redan meddelats i svenska tidningar har det ryska litterära sällskapet 'Tolstojs vänner' vid sitt senaste årsmöte beslutat utge Tolstojs samlade arbeten på Esperanto. Som bekant var författaren en entusiastisk anhängare av Esperanto och han verkade mycket för språkets spridande i Ryssland. Arbetena, av vilka en del redan utkommit, äro översatta av prof. Kabanov och författarinnan Anna Schaparov.

la 21an de februaro.

Plejparte okazis reelektioj. Prezidanto estas Erik Johansson, vicprezidanto Karl-Erik Peterson, sekretario Ivar Jentzell, vicsekretario Barbro Ilander kaj kasisto Evert Andersson. Aliaj personoj aktivitas en diversaj komisionoj de la klubo.

La jarkunveno ankaŭ decidis nomi Erik Ekström kaj Agda Olsson honoraj membroj de la klubo, pro la multjara laboro en la esperantomovado.

La klubo ankaŭ informas, ke E.W. Anjou gvidas esperantokursur por komencantoj, en kiu partoprenas naŭ kursanoj.

Ankaŭ Klubo Esperantista de **Malmö** jam havis jarkunve-

non. En ĝi oni povis aŭdi, ke la klubo havas 152 membrojn, du kursojn en la aŭtuno kaj kursur por gelernantoj en Rosengårdsskolan.

La Esperanto-societo de **Hallsberg** informas, ke ĝi nun havas konstantan ejon en la Popola domo. Sur la muro ĉe la ĉefenirejo estas informa ŝildo pri la klubo kaj pri esperanto, dum en oficejo apud la enirejo troviĝas broŝuroj pri esperanto.

Amika Rondo el **Sundsvall** povas informi pri tri kursoj por komencantoj dum la aŭtuno, kio estas la rezulto de ambicia informado pri esperanto en junulaj domoj, en lernejoj kaj inter geinstruistoj.

Kongressens officiella organ är «*Esperanto*», som numera tryckes i Bern och utkommer regelbundet två gånger i månaden.»

Enligt en artikel hämtad ur «*Svensk Polistidning*» skulle esperanto kunna komma till användning i bekämpandet av den vita slavhandeln. Låt oss citera:

«...eftersom man icke kan förneka de hinder, som härflyta ur språkförbistring, är och förblir jag övertygad därom, att esperanto skall bli till mycken hjälp i de internationella polisförbindelserna; på bekvämaste sätt skall detsamma så snabbt som möjligt göra de till användning lämnade underrättelserna förstådda, från vilket land de än härstamma ...»

Medelst esperanto uppnås för varje fall maximum av skyndsamtet, och i den fråga, som här är å bane, skall detta möjliggöra att i tid rädda flere offer och även gripa flere dylika

**VÄRLDSKONGRESSEN
VARNA 1978**

Avgifter till 31 mars 1978:

1. Icke medlem i UEA	340 skr
2. Medlem med årsbok	300 skr
3. Medlem med årsbok och tidn. «esperanto»	240 skr
4. Make/maka till (1)	245 skr
5. Make/maka till (2) eller (3)	210 skr
6. Ungdom t o m 20 år	105 skr
7. Universitetsstuderande t o m 30 år	175 skr
8. Synskadad	140 skr

Upplysningar och blanketter hos s-ino Ester Andrén, Regementsgatan 27d, 217 53 Malmö (tel. 040-6 52 09).

Betalningar till postgiro 14 74 29-5, Sv. Esperantoförbundet, Specialkonto, Malmö.

KALL ELSE:

Andelsägarna i Förlagsföreningen Esperanto upa

kallas härmed till ordinarie årsstämma söndagen den 23 april kl. 9.00 i Katedralskolan i Uppsala.

Ärenden enligt stadgarna, § 14.

Ombud för andelsägande föreningar skall inlämna fullmakt före årsmötets början.

Verksamhetsberättelse med ekonomisk rapport kommer ej att publiceras i *La Espero*, men kan erhållas från Esperantoförbundet, Fack, 200 42 Malmö, efter beställning.



Belgien. — För anordnande av Belgiska Esperantoförbundets femte kongress har staden Spaa beslutat bidraga med ett understöd à 300 francs.

Esperantos nionde världskongress. — Kommittén för kongressen meddelar, att årets kongress, den nionde i ordningen, kommer att hållas i Bern (Schweiz) och icke i Genua, såsom meningen var. Tiden är bestämd till den 24—31 augusti 1913.

Avgiften är 6 Sm. (11 kr).

agenter än under nuvarande förhållanden, då man ju vet, att tidsförlost, även den ringaste, vid bekämpande av kvinnohandeln, liksom för övrigt beträffande andra slags polisaffärer, kan utmynna i de allvarligaste konsekvenser.

Motverkandet av handeln med kvinnor lämnar hos oss polismän ett sannskyldigt verksamhetsfält, där esperanto för visso skall visa sig icke blott nyttigt utan även i högsta grad nödvändigt.»

Engelska är ett hot mot vårt språk!

Englands f.d. Navy Minister, Christopher Mayhew, fällde i parlamentet för inte så länge sedan följande yttrande: «I kampen för internationellt inflytande bör vi slutligen använda vårt mäktigaste vapen till fullo, nämligen det engelska språket. Engelska kommer med lätthet att gå om såväl franska, ryska, spanska och kinesiska som esperanto och kunna bli ett världsspråk i ordets rätta betydelse. Efterfrågan på lärare i engelska kommer att bli ofantlig och ge England en utmärkt möjlighet att erbjuda hjälp åt uländerna och därmed binda dessa till oss.»

Detta är ju ett klart och otvetydigt vittnesmål om avsikten med Englands speciella satsning på sitt språks spridning i andra länder. Att också USA hyser samma intresse är ju otvivelaktigt. Englands speciella organ för ändamålet, British Council, arbetar med årliga miljardanslag, och de utsända lärarna räknas i åtskilliga tiotusental.

På många håll bedrivs detta arbete under hårt motstånd, t ex i f.d. engelsktalande kolonier som, sedan de blivit fria, övergett engelskan som officiellt språk till förmån för det egna modersmålet.

Så mycket egendomligare förefaller det att vissa andra länder — inte minst Sverige — aningslöst faller i farstun för den angloamerikanska propagandan och på allt sätt under-

stöder och bidrar till dess framgång i sitt eget land.

I tider av snabb utveckling på alla områden, som vi upplevt under de senaste årtiondena, är det naturligt, att många nya ord måste lånas in. Vårt språk vimlar av sådana låneord, men oftast tar man engelska eller amerikanska ord utan hänsyn till om dessa låter sig ljudenligt och grammatiskt inordnas i svenska språket. Om detta får fortsätta kommer vårt språk snart att ändra karaktär, utarmas, förfulas och försämrats. Säkert ett önsketänkande för de angloamerikanska strävandena. Fenomenet uppträder givetvis också i andra länder. I Frankrike har tillsatts ett statligt organ, som skall motverka franskans anglicering.

Att faran i vårt land är överhängande märker vi ju dagligen. Våra underhållningsartister kan snart inte sjunga ett svenskt ord, ja, även när texten skall föreställa svensk, vrider man till uttalet, så att det låter amerikanskt. Grammfonskivor och kassetband håller på att dränka oss i angloamerikansk äcklig rotvältska.

Det är språket, som bär och bevarar vår säregna fäderneärvda kultur. Förlorar vi språket, så följer hela vårt kulturarv med. Och vad får vi i stället? Amerikansk läppstifts-tuggummi-cocacolakultur.

Det är hög tid att något görs

även hos oss till försvar mot denna smygande fiende. Men vad och hur? Vi trodde ju, att det skulle bli så bra med engelskan som världsspråk. I trettio år har vi satsat mycket pengar och tid på att göra svenska folket engelsktalande. Är resultatet tillfredsställande? Var det så vi ville ha det?

Trots allt klagar amerikanska turister på att svenskar inte förstår och kan ge svar på deras frågor.

Det verkar som om den frikostiga satsningen på engelskan var ett misstag, som kan få mindre önskvärda följder. Något världsspråk har engelskan heller inte blivit. Varken i FN eller EG har man kunnat enas om detta språk. I båda organisationer råder närmast språkkaos. Det kostar oerhörda summor och försvarar och försenar arbetet. Där, om någonstans, är man verkligen beroende av ett gemensamt språk. Men ingen vill ge England-USA den oskattbara favören att få sitt språk antaget. Och det är ju inte så underligt.

Språklig dominans skulle också innebära ekonomisk, politisk och kulturell dominans. I första hand skulle det innebära döden för alla små nationers språk och kulturer. Ungdomarna i England-USA skulle ha tusentals studietimmar till godo i jämförelse med andra länders ungdomar, som måste lära sig ett helt nytt (och ganska svårt) språk. Varje annat nationalspråk är naturligtvis ur den här synpunkten lika omöjligt som gemensamhetspråk.

Och ändå: det är inte bara FN och EG som är i stort behov av språkfrågans lösning. Alla jordens nationer är numera så

beroende av varandra och har så många gemensamma problem att lösa i fråga om naturvård, råvarutillgångar, socialstruktur, handel, turism, avrustning mm, att det vore förnuftigast att prioritera språkfrågan framför varje annan fråga. Allt skulle gå så mycket lättare sedan.

Av det förda resonemanget framgår, att inget nationalspråk är tänkbart som gemensamhetspråk. Valet måste alltså falla på något av de många konstruerade planspråken, eller också får man om möjligt skapa ett nytt och ännu bättre. Det senare alternativet har emellertid den nackdelen att vara en lösning på mycket lång sikt, och det har vi inte tid med. Det är dagens generation som måste lösa det problemet.

Runo Stridell

(*Artikeln är publicerad i Östgöta Correspondenten den 15 feb. 1978*)

HELSINGØR 1978

La internaciaj feriaj esperanto-kursoj, la 46-aj sinsekve, okazos la 23-an ĝis 29-an de julio en la Internacia Altlernejo de Helsingør, Danlando. Ni invitas vin veni por ĉeesti kaj ĝui neforgeseblajn tagojn en internacia rondo. Kaptu la okazon komenci aŭ perfektigi en la Internacia Lingvo. Programo senpage havebla ĉe s-ino Eva Langkilde, Ingemannsvej 18, DK-3000 Helsingør

Konstrui per

YTONG[®]
estas konstrui

ekonomie

brulsekure



YTONG AB

KONGRESSRESA TILL BULGARIEN

Kongressresan till årets världskongress i Varna, Bulgarien, är klar. Det blir en resa med många valmöjligheter: du kan välja var du vill flyga ifrån, du kan välja mellan tre olika logialternativ under själva kongressveckan och mellan hel- och halvpension i vissa fall.

Vad SEF erbjuder är ett tvåveckors arrangemang som innehåller en första vecka vid badorten *Zlatni Pjasaci* (Gyllene sanden, även känd som «Golden Sands»), c:a 15 km norr om Varna, där man kommer att bo på ett förstaklass hotell med helpension.

Den andra veckan, som är kongressvecka, kan man välja att bo kvar på samma hotell (alternativ B i tabellen här nedan) och åka in till kongressen på dagarna (folket på den bulgariska turistbyrån i Stockholm säger, att det finns bussar in till Varna var femte eller tionde minut). Man bor kvar med helpension och får matkuponger som gäller både på badorten och inne i Varna. Vi tror att detta alternativ blir särskilt attraktivt för dem som

vill ta familjen med sig.

Eller också väljer man att flytta närmare till kongressen och väljer att bo antingen i ett privatrum på 10 — 15 minuters avstånd från själva kongressen, med halvpension (alternativ A i tabellen), eller på lyxhotellet Varna som ligger c:a 6 km från kongresshallen (alternativ C i tabellen). På detta hotell har man möjlighet att välja mellan halv- och helpension.

NÄR BÖRJAR RESAN?

Om du reser från **Stockholm**, flyger du på **söndag den 23 juli** direkt till Varna, utan mellanlandning. Du kommer hem också på en söndag, den 6 augusti. Om du reser från **Köpenhamn**, flyger du på **måndag den 24 juli**. Du mellanlandar i Sofia. Hemresan går också på en måndag, den 7 augusti.

Förutom att man flyger på olika dagar så är det inte någon större skillnad på de två grupperna: alla flyttar den 29 juli (det är en lördag med *Interkona vespero* på kvällen), utom de som valt att stanna kvar, förstås.

OCH VAD KOSTAR KALASET?

Det blir stor skillnad på priserna, beroende på vad man väljer. Man kommer billigast

	från Sthlm	från Kbh
A privatrum i Varna, halvpension	1950	1870
tillägg för enkelrum hela tiden*	285	300
B 1:a klass hotell i Zlatni Pjasaci, helpension	2420	2350
tillägg för enkelrum hela tiden*	345	375
C lyxhotellet Varna, halvpension	3425	3425
tillägg för helpension	260	295
tillägg för enkelrum hela tiden*	710	780


1:a klass hotell, helpension, i Zlatni Pjasaci ingår i alla alternativ (fram till 29 juli)

* Betyder enkelrum även i Zlatni Pjasaci.

undan om man reser från Köpenhamn och bor i privatrum under kongressveckan, i dubbelrum. Det kostar 1870:-. Dyrast blir det också att resa från Köpenhamn, om man väljer enkelrum och helpension på lyxhotellet Varna. Då blir det jämt 4500 kronor, om vi räknat rätt. Alla priser finns i tabellen här intill.

DET HÄR ÄR INTE EN CHARTERRESA

Vi flyger reguljärflyg med Balkan Airlines och får förfoga över vår tid ganska fritt. En färdledare följer med någon av grupperna och kommer att finnas till hands hela tiden i Bulgarien, dessutom kommer det att finnas olika arrangemang från Balkanturist som man kan använda sig av på platsen.



Zlatni Pjasaci, Gyllene Sanden sett från havssidan

VAD INGÅR I PRISET?

I priset ingår:

- flyg till Varna och åter till Stockholm resp. Köpenhamn
- helpension på förstaklass hotell under första veckan och logi plus mat enligt eget val andra veckan
- buss från flygplatsen i Varna till hotellet i *Zlatni Pjasaci*, buss från hotellet i *Zlatni Pjasaci* till inkvarteringen i Varna (för dem som flyttar) och buss till flygplatsen vid återresan.

I priset ingår inte:

- kongressavgift, som betalas separat till pg 14 74 29-5, Sv. Esperantoförbundet, Specialkonto, Malmö, enligt uppgift i *La Espero*
- eventuella transporter un-

der kongressveckan

- måltidsdrycker
- avbeställningsskydd vid sjukdom. Det går att försäkra sig mot en avgift på 35 kronor.
- reseförsäkring; även en sådan går att teckna i samband med beställningen av resan.

SEF anordnar denna resa i samarbete med RESO. Därför gäller för den Svenska Resebyråföreningens allmänna bestämmelser (du kan hitta dem i RESOs semesterhandbok).

VAD GÖR DU OM DU VILL FÖLJA MED?

• Du beställer en anmälningsblankett hos Esperantoförbundet, Fack, 122 04 Stockholm-Enskede, eller hos fru Ester Andrén, Regementsg. 27d, 217 53 Malmö (tel. 04-6 52 09). Blanketter finns också hos din klubb. Fråga efter dem!

• Du kryssar på anmälningsblanketten för de alternativ du valt, eventuellt även för olika tilläggavgifter och skickar blanketten till fru Ester Andrén, senast den 10 april.

• Du betalar **500 kr till pg 14 74 29-5**, Sv. Esperantoförbundet, Specialkonto, Malmö plus ev. avgiften för avbeställningsskydd, också det **senast den 10 april**.

• Om du inte anmält dig till kongressen kan du göra det samtidigt och till samma postgirokonto. Du hittar avgifterna på en annan sida i *La Espero*.

• **Senast den 31 maj** betalar du den resterande summan. Du får i sinom tid ett meddelande om det.

• Sedan får du alla resehandlingar direkt från RESO, med exakt uppgift om flygtider, hotellnamn mm.

Välkommen med!